

ISAE oficiale registriĝis kiel organizo

Karaj amikoj,

kvankam ĉi tiu kajero havas kiel ĉefan celon disvastigi sciencajn artikolojn en Esperanto, ni volas kapti la okazon por informi pri gravaj okazintaĵoj ene de la asocio. ISAE nun havas sian juran registriĝon ĉe la Nederlandaj instancoj kiel neregistara organizo.

Sed kial sin registri? Ĉu tio estas vere necesa aŭ grava? Ja multaj fakaj esperanto-asocioj funkcias simple kiel neformala grupo, iuj povus demandi. Tio veras, sed ĉio dependas de la grandeco de niaj revoj unue, kaj agadoj tuj poste. Simple dirite: laŭ la kriterioj de la t.n. “ekstera mondo”, registrita instanco ekzistas, neformala grupo ne ekzistas. ISAE celas samnivele rilati kun aliaj sciencaj organizoj kaj certe neformala grupo ne aspektas same serioza kiel registrita instanco. Tio certe donas pli da respondecado al la estraranoj, sed aliflanke tio ankaŭ helpas ilin ne plu ŝarĝigante ilin kiel unuopulojn sed respondecigante tutan teamon. Ajna agado de ISAE kiel neregistrita grupo estus simple respondecado de la unuopuloj, dum nun estas tuta grupo kiu unuece respondecas.

Tio malfermas la vojon por agadoj kiuj ankoraŭ estis haltigataj dum iom da tempo ĝuste por teame respondi. Ekzemple baldaŭ la tuta arkivo (1949-2014) de Scienca Revuo estos rete publikigita. Ambicia projekto kun klara utilo, avangarde en la arkivoj de E-bultenoj.

Oficiala registriĝo en Nederlando ankaŭ permesos al ISAE konkuri samnivele por partopreni en internaciaj projektoj ricevante apogon kaj subtenon de diversaj instancoj inter kiuj Eŭropa Unio. Tio estis ebla nur danke al pluraj homoj kiuj helpis nin. Pinte je nia listo estas certe Universala Esperanto-Asocio (UEA), nia grava tegmenta organizo, kiu helpis nin paŝon post paŝo en la registra proceduro. Du lojalaj esperanto-geamikoj loĝantaj en Nederlando bonkore helpis nin konkretigi nian decidon registri la Asocion en tiu lando pro geografia proksimeco kaj lingva facileco. Ili akceptis la respondecon reprezenti la Asocion per siaj nomoj kaj subskriboj antaŭ la koncerna oficiala instanco.

Kiel ni antaŭvidis, la estraro raportis al la ISAE-anaro pri tiu ĉi grava elpaŝo okaze de nia lasta jarkunsido dum la Islanda UK kaj petis ĝian konsenton por ĝustigi la provizoran registron. Kun la aprobo de la membraro ni plu iris antaŭen laŭ la plano. Iom pli da tempo estis bezonata por pritrakti burokrataĵojn, sed nun ĉio estas en ordo. Nia asocio estas registrita kaj la nomo de ĉiuj estraranoj aperas en la dokumentoj.

Nun tempas por elani. Per etaj paŝoj oni multe promenas, kaj ni celas – kune kun via helpo – alporti ISAE-n al novaj horizontojn science kaj fake per Esperanto kaj – sekve – ankaŭ por Esperanto. Konstrua laboro pri lingva justeco en scienco atendas nin, samkiel pri diverstema sciencprezentoj en nia kara lingvo. Ĝuu ĉi tiun kajeron!

nome de la estraro de ISAE

FRANCESCO MAURELLI